TEJO-aktuale: numero 376, 2013-11-08

## Aĉetu t-ĉemizon kaj subtenu la Fonduson "Trampolino"!

Karaj amikoj, Ĉu vi volas helpi junajn esperantistojn agadi por Esperanto? Kaj ĉu vi jam havas la mojosajn t-ĉemizojn de TEJO kaj de Kontakto? Aĉetu por vi, aŭ faru belan kaj utilan donacon al viaj amikoj, filoj, nepoj, kaj aliaj karuloj. Daŭre haveblas pluraj modeloj kaj koloroj! Per tiu ĉi eta ago, vi samtempe subtenos la Fonduson Trampolino, kiu ekde la 1a de Januaro regule disponigos monsumon, por subteni etajn projektojn de TEJO-aĝaj aktivuloj. Elektu vian deziratan ĉemizon, kontrolu ĝian haveblecon, kaj mendu ĝin per la reta mendilo ĉe la paĝo http://www.tejo.org/eo/t-ĉemizoj (Skribu x-kode). Vi ankaŭ povas skribi por mendoj kaj informoj al oficejo ĉe tejo.org. TEJO, kaj la juna esperantistaro, antaŭdankas pro via subteno! Legi pli: http://tejo.org/eo/node/1543

## Retbabilejo

esperanto@conference.jabber.org estas retbabilejo kiu kungrupas homojn el tutmondo ekde jaroj. Tie estas la plej bona ejo por partopreni esperantaj babiloj, renkonti novaj homoj aŭ organizi esperantaj eventoj rete !

Kiel uzi tion ? Simple iru sur http://babilejo.org kaj elekti kromnomo. Tamen babilejo verŝajne estos pli agrabla tra programaro kiel Gajim aŭ Pidgin.
Jabber ? Estas babilprotokolo (ke uzas Google kaj Facebook) kiu estas neŭtrala, etendebla, ... kiel la Esperanto !
Plie Jabber eblas protekti via privata vivo ĉar ĝi eblas inconiteco kaj ĉifreco. Tial Jabber kaj tiu babilejo estas pli bone ol aliaj kaj vi devus uzi ĝin!

Ni varme atendas vin !

ps : se vi administras esperantan ttt-ejon, vi povas simple aldoni la babilejo sur via ttt-ejo danke al Jappix Mini.

## [Esperanto] Kiel kontroli longan tekston por trovi ĉiujn eblajn erarojn en ĝi?

Se koncernas dosieron en MS Word (.doc), ekzistas jam kvin jarojn taŭga programo por tio, senpage elŝutebla el http://www.espsof.com. Ĝi spuras literum-, tajp- kaj skan-erarojn, sed malnepre ankaŭ ebligas vidi la morfemstrukturon de vortkunmetaĵoj, listigi gramatikajn rilatajn, aŭ fari konkordancon de iu ajn vorto tra la teksto.

## [Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO)] TEJO vojaĝigas vin!

*Malsukcesa elŝuto.*

## [instru-german] Nova Elano por Juna Amiko

*Malsukcesa elŝuto.*

## [Esperanto] Disdono de la FAME-premio 2014

Du meritplenaj esperantistoj, Utho Maier kaj Karl Heinz Schaeffer, ricevas la FAME-premion 2014 en valoro de 3.000 €. La distingo iom surprizas pro tio, ke ili mem estas multjaraj aktivuloj de tiu fondaĵo.
http://www.pressemeldung-baden-wuerttemberg.de/aalen-fame-stiftung-zur-foerderung-internationaler-verstaendigungsmittel-und-stadt-aalen-7845/

## Raporto post la 25aj Eŭropaj Rendevuoj

La 16-17an okazis la 25a jubilea Eŭrŭopa Rendevuo en la nordfrancia urbo Le Touquet - Stella Plage, tre proksime al la urbo Bulonjo sur Maro. Lingvokurso, trejnado, seminario, prelegoj, RISKO, koncerto, disdono de KER-atestiloj, arta ekspozicio.... Legu pli ĉe la paĝo: http://edukado.net/novajhoj?id=401

## DU FILMOJ ALDONIĜIS AL LA RETA KINEJO

Lastatempe du filmoj aldoniĝis al la Reta Kinejo de UEA. La unua estas registraĵo de la programero “La nova Estraro sin prezentas” en la 98-a Universala Kongreso en Rejkjaviko. La programero daŭris unu kaj duonan horojn, sed por pli komforta spektado la filmo estas dividita en tri partojn. “Unue” prezidanto Mark Fettes kaj la ses aliaj estraranoj prezentas sin, rakontante pri sia esperantistiĝo kaj antaŭa movada agado. En la dua parto” ĝenerala sekretario Martin Schäffer rakontas pri la novstila labormaniero de la Estraro kaj prezidanto Fettes skizas la ĉefan enhavon de la ĵus akceptita Strategia Plano de UEA. La fino de la dua parto kaj la tuta “tria parto” konsistas el la demandoj de la publiko kaj la respondoj de la estraranoj.

La alia filmo, “La Zamenhofa revo”, estis registrita jam du jarojn pli frue en la 96-a UK en Kopenhago en 2011. Temas pri la prelego de Davide Astori el Italio en la Internacia Kongresa Universitato. La plena titolo de la prelego estis “La Zamenhofa revo” inter lingvistika kaj religia planizado: interpopola dialogo kaj tutmonda interkompreno per Esperanto kaj homaranismo. Ankaŭ tiu ĉi filmo estas dividita en tri partojn, kiuj daŭras po ĉ. 15 minutojn. La prelego mem konsistigas la “unuan” kaj “duan” partojn, dum la “tria parto” enhavas la postan diskuton, en kiu unu el intervenintoj estis la intertempe forpasinta zamenhofologo Zofia Banet-Fornalowa.

Ambaŭ filmoj estis registritaj kaj redaktitaj de Francisco L. Veuthey. (Fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 520, 2013-11-08) Legu pli: [http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=520#2](http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=520#2)

## [instru-german] Kursa registrado ĉe UEA kaj ILEI

*Malsukcesa elŝuto.*

### Venontaj renkontiĝoj

Studsabato- en CDELI, La Chaŭx-de-Fonds, Svislando, 14a de decembro 2013, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/

30a Internacio Festivalo, Nördlingen, Germanio, 27a de decembro 2013 ĝis 3a de januaro 2014, http://www.internacia-festivalo.de

12-a Novjara Renkontiĝo (NR) kaj la 5-a Novjara Internacia Semajno (NIS) en Saarbrücken, Germanio, 27a de decembro 2013 ĝis 3a de januaro 2014, http://www.esperantoland.org/nr kaj http://www.esperantoland.org/nis

5-a Junulara E-Semajno, Szczawno-Zdrój, Pollando, 28.12.2013 ĝis 04.01.2014, http://jes.pej.pl/2013/

Jarfina FESTego, Greziljono, Francio, 28a de decembro 2013 ĝis 2a de januaro 2014, http://gresillon.org/jarfine

SANO 4, Herzberg – la esperanto urbo, Germanio, 29a de decembro 2013 ĝis 2a de januaro 2013, esperanto-zentrum ĉe web.de

5-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE), 29a de decembro 2013 ĝis 4a de januaro 2014, Kotonuo, Benino, http://mirejo3.blogspot.com

5a Novjara Aranĝo (NOVA), Petropolo, subŝtato Rio-de-Ĵanejro, Brazilo, 2-a ĝis la 5-a de januaro 2014, http://novjaraaranĝo.wordpress.com (Skribu x-kode)

Studsabato- en CDELI, La Chaŭx-de-Fonds, Svislando, 18a de januaro 2013, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/

1a Internacia Esperanto-Kongreso en Nikaragvo, Granada, Nikaragvo, 24a ĝis 27a de januaro 2014, http://www.esperanto-nicaragua.org/eo/kongreso aŭ https://www.facebook.com/events/633860309978810/

Studsabato- en CDELI, La Chaŭx-de-Fonds, Svislando, 15a de februaro 2013, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/

La 2a sudazia Seminario okazos en Lahor-urbo, Pakistano, 25a Februaro ĝis 1a Marto 2014, https://www.dropbox.com/s/zxoj3pyz0szrphm/UNUA%20BULTENO%20de%202a%20SAS%20en%20Pakistano.pdf

Studsabato- en CDELI, La Chaŭx-de-Fonds, Svislando, 15a de marto 2013, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu